


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 601 (12) DECEMBRO 1955



Kiamaniere la revuo plej efike servu la bezonojn de la movado? Tiun demandon kune studas (*de maldekstre*) redaktoro *Auld*, Ĝenerala Sekretario *D-ro Lapenna* kaj eksredaktoro *Rossetti*.

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER*Honora Redaktoro* : HANS JAKOB*Ĉion por la redakcio* oni sendu al
Redaktoro : W. AULDKnockfarril, Thornsidge Road, Johnstone,
Renfrewshire, Skotlando*Ĉion pri administrado* de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu alUNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., NederlandoTraduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.**Jara abono (1955)** : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.**Anoncetoj pri korespondado :**2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond
kupono por ĉiu duo da vortoj**Legantoj en 80 landoj****Eldonnumero 6250**

Enhavo

	paĝo
Kvanto kaj kvalito	341
Saluto el la nova hejmo de UEA	342
Festtaga Konkurso	347
Kio malbone funkcias en nia movado ?	348
La kastelo de Hamleto. C. G. Fighiera	351
Partoprenu en Eŭropa Radio Programo	352
Se mi estus birdo. Urban	357
Leonido Vasiljef—70-jara	358
Nova gramofona disko	360
Vagado sub palmoj (5). Ribillard	361
Poezio	
Komenco kaj fino. J. Korinek	350
Manfredi. Dante (Dondi)	356
Rubrikoj	
Tra la mondo esperantista	343
41a U.K. de Esperanto	349
Grupa vivo : Eksteraj rilatoj	353
Belarta Konkurso 1956	355
Enigmaj Konkursoj	355
Radio	364
Nekrologo	365
Esperantista vivo	365
Oficiala informilo	366

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 601

Decembro 1955



Kvanto kaj Kvalito

DUM la postmilita periodo UEA plifortiĝas tiel kvante kiel kvalite. Momenta pripenso al la multnombraj kulturaj kaj aliaj aranĝoj organizitaj kaj organizataj de nia Asocio—ekzemple (kaj mi mencias nur kelkajn), la plej altnivela konsisto de la Internaciaj Someraj Universitatoj, kies kvalito estus rimarkinda en iu ajn universitato; la Belartaj Konkursoj; la informado kaj dokumentado laŭ la esploroj de CED—kaj al la unika servado de nia Asocio pere de siaj Delegitoj, sia gazetara servo, k.c.—konvinkas pri la kreskanta kvalito de UEA.

Tiu ĉi kvalita kresko jam portis siajn fruktojn. En Montevideo ni ricevis la plej riĉan rikolton de nia ĝisnuna historio. Kaj, kiel rezulto de la kreskanta kvalito de la Asocio, ankaŭ kvante UEA rimarkinde kreskas. Dum la nuna jaro la

membraro asocia kaj individua atingos rekordan ciferon. La legantoj povos konstati la plenan rezulton nur per la Statistiko publikigota en la februara numero, sed jam nun ili povas vidi mem, ke nia kvanta plifortiĝo estas fakto.

Kaj kvanta plifortiĝo ebligos daŭran plifortiĝon kvalitan, kiu siaflanke kondukos al konstanta plifortiĝo kvanta. Tiuj du faktoroj reciproke sin influas por la bono de nia afero.

Neniam niaj horizontoj estis pli helaj. Kaj en nia afero ĉiu laboranto estas grava. Ĉiu membro kontribuas al la laboro de UEA kaj al la fina venko de nia afero. Unueco estas forto! Ĉiu membro *tuj* pagu sian kotizon por 1956, ĉiu nemembra leganto *tuj* aliĝu al UEA, por ke la venonta jaro donu rikolton eĉ pli riĉan al nia Movado! W.A.

Grava atentigo!

La nova adreso de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) estas:

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo

Ĉion por CED bonvolu de nun sendi al tiu adreso!

Saluto el la Nova Hejmo de U.E.A.


La 15-an de Novembro komenciĝis la normala funkciado de la Administra Oficejo en Rotterdam, Eendrachtsweg 7.

Ne estis facila tiu ĉi transira periodo, sed la agordo estis kaj estas bonega. Dum multaj sinsekvaj semajnoj oni laboris dumtage kaj vespere kaj dimanĉe same en Heronsgate kiel en Rotterdam. Sed, se en Heronsgate en plena mallumo per torĉo tra kota vojeto ni devis atingi la vivantan mondon je multkilometra distanco por havigi al ni vespermanĝon, en Rotterdam ni paŝas post la laboro en gaje lumigita vivplena aleo kun butikoj, kafejoj kaj trafikiloj ĉie kaj ni sentas nin feliĉaj kaj fieraj, ke ĉi tie troviĝas nia monda centro. Kaj vidu, kiel tiras la atenton de ĉiu preterpasanto niaj bele aranĝitaj montrofenestroj kun la plej elstaraj verkoj de la Esperanto-literaturo!

Ankoraŭ venos malfacila tempo, dum kiu ni devos solvi multajn problemojn radikantajn en la antaŭa periodo, pri kies detaloj ni ne disponas pro malkompleteco de multaj dosieroj je la momento de la transpreno. Tial, ni petas la kunlaboron de ĉiuj landaj asocioj, ĉefdelegitoj, libroservoj, konthavantoj kaj aliaj regulaj korespondantoj, bonvole doni eventuale petatajn klarigojn ĝis ni estos farintaj plenan ordon. Pro funkciado de i.a. oficistoj-neesperantistoj en la oficejo dum la pasinta somero, iuj eraroj ja ne estis eviteblaj. Ges. Rapley kun granda afableco kaj helpemo donis multajn informojn dum ili estis ankoraŭ en la oficejo kaj ankaŭ S-ro Goldsmith plurfoje vizitis nin kaj estis ĉiam preta doni ĉiajn klarigojn. Al ili ĉiuj ni direktas nian sinceran dankon. Post foriro de la malnovaj oficistoj al aliaj postenoj laboris en la C.O. dum pluraj semajnoj S-ino M. C. Major kaj post ŝia forveturo al posteno en Ĝenevo alkuris al Heronsgate la nova redaktoro de la revuo "Esperanto", S-ro W. Auld, kiu ne nur estas konata poeto, sed scias ankaŭ perfekte, praktike kaj celtrafe solvi oficejajn aferojn kaj kiu restis ĝis la momento de la transporto.

Krome, dum la transira periodo, dum ĉ. 2 monatoj gvidis la oficejon la Ĝenerala Sekretario, Prof. Ivo Lapenna kaj laboris tie kiel oficistino S-ino Ljuba Lapenna. Ambaŭ perdis ĉiutage 3–4 horojn per vojaĝado, neglektis la laborojn de la Ĝenerala Sekretarieco, la profesiajn laborojn kaj la aranĝadon de fine ricevita propra loĝejo en Londono, por ke je la momento de transiro la kaslibroj, membraro kaj ĉiuj aliaj esence gravaj aferoj estu en plena ordo. La rezulto estis, ke amaso da pendantaj problemoj kaj problemetoj estis solvitaj ankoraŭ en Heronsgate kaj tio signifas nemezureblan plifaciligon de niaj laboroj ĉi tie en Rotterdam. Pro tiu nekredebla ofereco de Ges. Lapenna en plej malkonvena momento koncerne iliajn privatajn cirkonstancojn, ni, Roterdamaj geoficistoj, deziras ĉi tie publike esprimi nian senfinan dankon. Tiu ĉi ilia ago estis esence grava por la senĉesa glata funkciado de la oficejo. Samtempe, ĝi signifas malfacile takseblan perdon por la movado pro paralizigo de la aktivecoj de la Ĝenerala Sekretario en tre grava periodo de nia historio. Ni povas nur esperi ke poste, per renovigita energio post bona ripozo, tiu perdo estos parte kompensata kaj pro tio, denove, la Ĝenerala Sekretario meritos la dankon de la tuta movado.

Marianne H. Vermaas, Administranto



Tra la Mondo Esperantista

Ni petas regulajn raportojn aŭ raportetojn el ĉiuj mondpartoj por tiu ĉi rubriko, por ke ĝi prezentu tutampleksan bildon pri agado, eventoj kaj interesaĵoj el la Esperanta mondo.

Bulgarujo

Tre kontentige daŭras la revigliĝo de nia movado en Bulgarujo. Ĝis la fino de septembro 425 geesperantistoj pagis sian membrokotizon al la Bulgara Esperantista Asocio, kaj 552 pagis abonon al la Bulteno. Ĉiutage alvenas novaj pagoj. La 11an de septembro okazis en *Plovdiv* Bulgara Esperantista Konferenco, kiun partoprenis 205 samideanoj el 55 loĝlokoj. Per rezolucio la Konferenco skizis taŭgan programon de serioza eklaboro.

* * *

Ĉe la sofia esperantista klubo fondiĝis dum septembro *Esperanto-estrado "Flamo"*. Inter aliaj programoj oni preparas artliteraturan legadon *La mondo ridas*, kaj oni petas literaturemajn humurŝatantajn gesamideanojn helpi per elekto, traduko kaj alsendo de ne tro longaj humuraj rakontoj, kiujn oni rekompencos per samspeca bulgara verko. Adreso: Esperanto-Estrado "Flamo", Bul. Stalin 40, Sofio, Bulgarujo.

* * *

En *Kolarovgrad* (antaŭe *Ŝumen*) refondiĝis la Societo Esperantista "Vekiĝo". Fariĝis prezidanto s-ano *Ilija Silvestriev*, kiu antaŭ 50 jaroj fondis tiun grupon! La entuziasmaj anoj planas viglan laboradon.

Ĉeĥoslovakio

La fama verko *Kon-Tiki* de Thor Heyerdahl nun estas eldonita ankaŭ en slovaka lingvo. La tradukinto, *Eduard V. Tvaržek*, ne tradukis el la originala lingvo sed el la esperanta

traduko eldonita en Stockholm, 1951. La aspekto de la slovaka volumo estas tre plaĉa, kun alloga bindaĵo kaj specialaj postkovrilpaperoj, kaj enhavas ĉiujn fotografaĵojn de la esperanta eldono.

Tiu ĉi nova traduko viciĝas apud la tre multaj aliaj, precipe ĉinlingvaj kaj japanlingvaj, tradukoj ebligataj pere de la internacia lingvo.

Danujo

Centra Dana Esperantista Ligo faris afiŝ-konkurson por ricevi bonan proponon por afiŝo, kiu povos propagandi por Esperanto. Sume alvenis 9 konkursaĵoj. Ĉe la prijuĝo S-ro *Bartosik*, Praha, Ĉeĥoslovakio ricevis premion de 100 danaj kronoj, kaj S-ro *I. Šponar*, Zagreb, Jugoslavio, ricevis honoran mencion.

Francujo

Informa Esperantista Komitato, gvidata de Generalo *Bastien*, Honora Prezidanto de UEA, ĵus aperigis *Militistan Vortareton* en kvin lingvoj: esperanta, franca, angla, germana kaj itala. Tiu libreto estos sendata al: ĉiuj reprezentantoj de O.T.A.N. (N.A.T.O.); Organizaĵo de la Internacia Ruĝa Kruco; militistaj lernejoj; naciaj esperantistaj organizaĵoj.

La libreto estas aĉetebla ĉe UEA, prezo 2ŝ plus 2p afranko.

Germanujo

La ĉefartikolo en la revuo de oktobro montras la ĝojigan fakton, ke nia grandioza idealo denove ekbrilis ankaŭ en la landoj "mal-antaŭ la kurteno". Legantoj eble miris, ke inter la landoj tie menciitaj mankas DDR (orienta Germanujo). Sed tio tute ne pruvas, ke ĉiuj malnovaj zamenhofanoj tie dormas. Mankas ankoraŭ nur la oficiala sankcio. Tamen la planto kreskas. La 16an de oktobro kolektiĝis en *Dresden* 40 geamikoj. Atentinda nombro, se oni pripensas, ke la plej alta nombro ĝis nun estis 20. El *Pirna* partoprenis nia korespondanto kun du junaj amikoj. Li konstatis, ke proksimume kvarono de la partoprenintoj estis postmilitaj adeptoj. Oni diskutis la nunajn perspektivojn, kiujn vidigas la nova vento parte dispelinta la grizajn nubojn, kiuj tiel longe ĉirkaŭis tiun regionon kaj ankoraŭ ĉirkaŭas. Regule renkontiĝas ĉiumonate geamikoj en la regiono *Pirna-Dresden*. La 25an de septembro oni renkontiĝis en *Dresden-Wachwitz*, kaj samtage alia rondo estis sur la monto *Mönchswalder Berg* en *Luzacio*. Ankoraŭ aliaj amikoj kunvenis en *Oschatz* la 18an de Septembro.

Italujo

Esperanto-Propaganda Centro Casella Postale 1175, Milano eldonos dum 1956 la faman verkon *Plena Gramatiko de Esperanto* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Jam du eldonoj de tiu verko tute disvendiĝis. La 3a eldono aperos en 3 volumoj: I, Fonetiko, Morfologio kaj Sinetio; II, Sintakso; III, Vortfarado. Antaŭmendoj je favora prezo estas jam nun akceptataj.

Norvegujo

Dum aŭgusto 1955 okazis en *Trondhejmo* junular-tendaro de la *Mondkonsilantaro de Eklezioj*. Kelkaj estraranoj de la loka grupo esperantista, kiuj vizitis la tendaron, trovis tie 10 gejunulojn el 6 landoj. Je la demando: "Kiuj estas viaj plej grandaj malfacilaĵoj por kontakti gejunulojn an aliaj landoj?", oni respondis: "La lingvaj problemoj!" Ĉu estus eble interesigi nian junan esperantistaron pri tiuj tendaroj?

Polujo


En *Varsovio*, en la nova klubejo de *Asocio de Esperantistoj en Pollando*, post multjara interrompo, okazas denove regulaj esperanto-kursoj. En la nunaj du kursoj partoprenas pli ol 100 lernantoj. Korespondemuloj skribu al: A.E.P. (Kursa Fakto), strato Kozia 3-31, Warszawa 40.

* * *

Korekto. En revuo Esperanto n-ro 599, p. 285, en la artikolo "Pola Junula Festivalo", anstataŭ *Polo Michalik* legu: *Polo Michalski*. (Kun pardonpeto al la koncerna samideano!)

Esperanto antaŭ la Eŭropa Konsilantaro

Komence de la aŭtuna sesio de la Eŭropa Konsulta Asembleo niaj s-anoj Dr. Herrmann, Lampertheim/Germanujo, L. Laurat, Parizo, kaj P. Petit, Rosny-sous-Bois, ambaŭ el Francujo, estis en Strasburgo kaj sukcesis ricevi la subskribojn de 14 delegitoj el Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Norvegujo sub propono de nova rekomendo pri la lingvo-problemo. Por ke la Eŭropa Konsilantaro povu ekzameni, ĉu Esperanto eble donos elvojon el la lingvaj malfacilaĵoj, oni proponas



Nia bildo montras kelkajn el la 360 partoprenintoj de la 42a Kongreso de Japanaj Esperantistoj en Kansai Universitato, la 27an ĝis 29an de aŭgusto 1955. La sukcesa kongreso havis seriozan programon. Ĉe la Kongresa Universitato prelegis s-anoj Mijata, Oŝaka kaj Ŝindo.



La supra poŝtkarto, kiu montras ĝis nun eldonitajn Esperanto-poŝtmarkojn, estas eldonita kaj havebla de : A. Sindl, Kirchenweg 12, St. Pölten, Aŭstrujo. La enspezoj estas uzotaj por eldoni novajn propagandilojn de Esperanto.

kiel eksperimenton la oficialan instruadon de Esperanto en po unu klaso kun lernantoj 11 ĝis 14 jaraj en Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando. Post unu jaro de studado la lernantoj estu ekzamenataj en Strasburgo. La 25an de oktobro konsiderinte la aferon la Konsulta Asembleo decidis sendi la proponon al la kompetenta Komitato por Kulturaj Sciencaj Demandoj por prepara pritraktado. La Konsulta Asembleo verŝajne jam dum la maja sesio 1956 definitive decidis pri la rekomendo. Ni esperas, ke estos eble dum tiu sesio montri ankaŭ la faman Esperanto-Ekspozicion de Montevideo en Strasburgo. Pri la plua evoluo de tiu tre grava afero la esperantista publiko ĝustatempe ricevos la necesajn informojn. Ni urĝe petas niajn gesamideanojn, ke ili ne ĝenu iun ajn oficialan instancon aŭ personon sen komizio de la Ĝenerala Sekretario de UEA D-ro Lapenna aŭ de la gvidanto de la Eŭropa Kampanjo D-ro Herrmann en Lampertheim/Germanujo.

La aranĝoj de la Katolikaj Esperantistoj

dum la 40a U.K. en Bologna

Krom la katolika kongres-Diservo dimanĉon la 31a de julio (sankta meso kun komuna E-preĝado kaj E-prediko

tre aktuala de pastro *M. Carolfi O.F.M.*) en la granda preĝejo de *Sta. Jakobo* proksima al la kongresejo, okazis Fakkunsido de la katolikaj esperantistoj mardon la 2an de aŭgusto en la salonego de pastroj franciskanaj, sub prezido de kaplano *Thalmaier*, Munkeno. Samtage okazis vespera meso kun E-kantado kaj alparolado de pastro *Carolfi* okaze de malkovro de marmora memoraĵo honore al s. papo *Pio Xa*, patrono de la katolikaj esperantistoj, en la provizora paroĥa preĝejo de *Sta. Pio Xa* en ekstera kvartalo de Bologna, inter laborejoj kaj laboristaj domoj.

Kulmino estis la solena kunveno kaj ovacio al Kardinalo *Lercaro*, ĉefepiskopo de Bologna, kiu en detala signifoplena parolado konstatis i.a., ke la idealo de la katolikaj esperantistoj estas "profunde homama kaj fundamente kristana." Enkonduke esprimis specialan sindonsaluton pastro *M. Boglary*; per edificaj kant-prezentadoj kontribuis S-ino *Andreine Desderi* kaj S-ano *Augusto Kohler*. Por la denaskaj esperantistoj parolis S-ano *Karlo Minnaja*. Fine Kardinalo *Lercaro* estis petata, akcepti la protektadon de la katolikaj esperantistoj. Je grandega aplaŭdo la kardinalo konsentis. Li ankaŭ direktis impresplenan, alte konsiderindan salutleteron al la esperantistoj venintaj al Bologna. W.M.

Bv. atenti !

(1) Ĉion por la administrado de UEA nepre sendu nur al :

U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., Nederlando

(2) Pro la translokigo de nia Oficejo, la Unua Parto de la Jarlibro 1956 povos aperi nur en marto.

Festtaga Konkurso

		P					 poentoj
		O					 poentoj
		E					 poentoj
		N					 poentoj
		T					 poentoj
		S					 poentoj
		U					 poentoj
		M					 poentoj
Sume							poentoj

Antaŭ unu jaro ni aranĝis konkurson, kiu vekis grandan intereson inter niaj legantoj. Tial ni kuraĝas prezenti ankaŭ ĉijare ion similan.

En la supra kadro estas loko por 8 horizontalaj vortoj. Permesata estas iu ajn 7-silaba vorto nefleksita. Se vi elektas iun substantivon, ĝi do devas finiĝi per *o*, verbo per *i* kaj adjektivo per *a*. La unua vorto sekve povas esti ekz. : imperio, repreni aŭ kaptema k.t.p.

Permesataj estas nur vortoj aŭ kunmetitaj vortoj, kiuj troviĝas en Plena Vortaro (ne en la Suplemento). Ni faras tiun limigon, ĉar la esperantistoj kelkfoje havas tre aŭ tro viglan fantazion je kreado de plej kuriozaj vortkombinaĵoj.

Ĉiu litero ricevas je la unua apero valoron de 1 poento, sed je ripeto de la sama litero ĝia valoro plialtiĝas ĉiam je unu poento. Ekzemple imagu ke vi unue elektas la vorton REPENI. La unua R donas 1 poenton, E=1 poenton, P=1 poenton, R=2 poentojn, E=2 poentojn, N=1 poenton kaj I=1 poenton. Se la venonta vorto estas ekz. PROMENI, la poentciferoj estas : P=2 poentoj, R=3 poentoj, O=1 poenton, M=1 poenton, E=3 poentoj, N=2 poentoj kaj I=2 poentoj.

Kiu atingos la plej altan poentsumon gajnos la *Unuan premion* : Libroj laŭ propra elekto je valoro de maks. 50 anglaj ŝilingoj (aŭ Senpaga membreco kiel Membro-Subtenanto de UEA por 1956 kaj krome libroj je valoro de 20 ŝilingoj). *Dua premio* : Libroj je valoro de 20 ŝilingoj. *Tria—Kvina premioj* : Libroj je valoro de 10 ŝilingoj.

Via solvo devas atingi nin antaŭ 1 februaro 1956. (Ekstereŭropanoj sendu per aerogramo). Adreso : *ESPERANTO, Festtaga Konkurso, Tegelbacken, Stockholm, Svedlando*. Agrablajn festotagojn deziras al vi

La Konkursa Komitato.

Grava enketo

Kio Malbone Funkcias en Nia Movado ?

En lastatempaj konversacioj kun D-ro Ivo Lapenna ni konstatis, ke estas vero ke nia Movado marŝas antaŭen, kaj de jaro al jaro la kvanto de la Esperanto-parolantaj personoj pligrandiĝas en la mondo. Tamen ni devas konstati, ke tiu progreso ne estas proporcia al la strebado de pluraj miloj da personoj, kiuj ĉiutage oferas parton de siaj tempo, energio kaj kapablo por konkeri novajn adeptojn. La Movado, speciale nun, post ĝia agnosko fare de UNESKO, jam estas sufiĉe grava por ke ĝi povu kuraĝe serĉi la mankon en siaj propraj vicoj, por povi poste starigi diagnozon pri la “malsano” de la Movado, kaj fine eventuale trovi la rimedon por ĝin kuraci.

Kiel unua paŝo, ni entreprenas enketon pri la vivo de la grupoj kaj la landaj asocioj, en la tri aspektoj de nia aktiveco: INFORMADO (por altiri interesatojn), INSTRUADO (por enkonduki ilin en la Movadon) kaj ORGANIZADO (por reteni la esperantistojn). Ni entreprenas ĉi enketon je la nomo de CED, kaj vian respondon bonvolu direkti al la adreso: Marinko Ĝivoje, *Ljubljana*, Gornji trg 31, Jugoslavio. La enketo estas *mondiskala*, kaj ni esperas, ke vi komprenos ĝian gravecon, kaj ne rifuzos la kunlaboron. Ni jam posedas plurajn respondojn el Norvegio kaj Francio, kie la landa asocio bone organizis la aferon. Okaze de via respondo ne transskribu la demandaron, sed nur respondu al unuopaj punktoj.

Marinko Ĝivoje
kunlaboranto de CED

Lic. Tibor Sekelj
komitatano de UEA
kunlaboranto de CED

DEMANDARO**I. Informado :**

(1) Kiom da artikoloj estas publikigitaj monate en via urbo pri Esperanto? Kial ne pli multe? Ĉu manko de verkistoj? Malfacilo penetri en la ĵurnalojn? Manko de klopodantoj?

(2) Kiom da paroladoj okazas pri Esperanto meznombro en via urbo? Se malmulte, ĉu la kaŭzo de tio estas: (a) manko de preleganto? (b) manko de personoj kapablaj atingi ejon en kulturaj societoj, kluboj, lernejoj, k.t.p.?

(3) Kiun mezan nombron da ĉeestantoj havas la prelegoj?

(4) Kiu procento de la aŭskultantaro enskribiĝas en proksimajn kursojn?

II. Instruado :

(1) Kiom da kursoj okazas jare meznombro: elementaj; perfektigaj; superaj? Se malmultaj, ĉu (a) pro manko de instruantoj? (b) pro manko de lernantoj? (c) pro neeblo trovi ejon?

(2) Kiu procento de la enskribitoj finas la kurson?

III. Organizo :

(1) Kiom da regulaj kunvenoj okazas monate?

(2) Kiu procento de la membraro ĉeestas regule la kunvenojn?

(3) Kiom da procentoj partoprenas aktive la laborojn de la grupo? Kiel oni povus laŭ via opinio plibonigi tiun staton?

IV. Rimarkoj.

Urbo kaj dato. Kvanto de loĝantoj. Lando. Informanto.



41-a Universala Kongreso de Esperanto

Kopenhago — Danlando

4 aŭgusto — 11 aŭgusto 1956

N-ro 1

OFICIALA KOMUNIKO

Novembro 1956

Adreso : Por korespondaĵoj sufiĉas : 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Banko : La kongresa banko estas : Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

Postgirkonto : 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

Pagoj : Oni povas pagi al la oficialaj perantoj (listo aperis en la unua bulteno), sed necesas sendi al ili samtempe la aliĝilon.

Aliĝiloj : Petu ilin ĉe la perantoj, ĉe la landaj asocioj aŭ ĉe 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Nova Peranto : La nederlanda landa asocio L.E.E.N.

Glumarko : Oni povas aĉeti la kongresan glumarkon ĉe la perantoj, ĉe via landa libro-servo aŭ ĉe 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando. Prezo : po 50 oeroj aŭ 1 internacia respond-kupono por ĉiu folio de 25 markoj. La esperantistoj estas petataj uzi amase ĉi tiun propagandilon.

Aliĝlimigo : Pro diversaj teknikaj kaŭzoj ne povas esti akceptataj pli

ol 2200 aliĝiloj.

Infana Kongreseto : L.K.K. decidis organizi en la kadro de la 41-a U.K. la 1-an Internacian Infankongreseton por esperanto-parolantaj infanoj ĝis 13 jaroj. La aranĝoj okazos en la infanĝardeno "La ludoĉambro", kie Esperanto estas instrua fako. En la kongresejo okazos ekspozicio de infanaj manartaĵoj. Detaloj sekvos en venontaj komunikoj.

Artikoloj : Kluboj, aliĝintaj al landa asocio povas ricevi artikolon pri la kongresurbo kaj lando por kluba programo. Mendu pere de via landa asocio.

Postkongreso : L.K.K. elektis kiel oficialan postkongresan urbon : MALMO, Svedujo. Detaloj sekvos.

Statistiko (ĝis fino de oktobro) : Anglujo 17, Aŭstrujo 2, Belgujo 2, Brazilo 3, Danlando 34, Finnlando 6, Francujo 28, Germanujo 17, Hispanujo 4, Italujo 37, Jugoslavujo 27, Nederlando 11, Norvegujo 9, Nov-zelando 1, Svedujo 25, Svisujo 7, Usono 2. Sumo : 232 el 17 landoj (pasintjaro 170 el 20 landoj).

Gian Carlo Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario



Belarta Konkurso 1955.

Originala Poezio : Dua premio

Komenco kaj fino

En ĉiu ĵuskomenco naskiĝas jam la fin' !
 El roza ekburgono
 jam spiras velkaromo,
 kaj ĉiu altsvingiĝo al fal' preparas sin.

En ĉiu matenruĝo krepuskas jam vesper',
 kaj en plej gaja rido
 embuskas plorinsido,
 en ĉiu iluzio jam rodas sobra ver'.

En ĉiu ekdeziro jam grizas elreviĝ' ;
 nur temp' neniam haltas,
 sed kio naske startas
 gravedas jam je morto, je laca malleviĝ'.

Sed vi al pura ĝojo gutigu ne el gal',
 vi sole ne forgesu,
 delicon saĝe pesu,
 sciante, ke en brilo jam dormas svena pal'.

Se vi pri amo pensis kaj ĉion rabis van',
 sciu, dum via koro
 eldronas en doloro :
 kun ĉiu trofeliĉo trist' iras man' en man'.

Sagace vivon prenu kun sci' ke venos solv',
 ja viv' kaj tuta mondo
 eterna estas rondo,
 post start' alstela venas malstart' en tera polv'.

Jiří Kořinek

La Kastelo de Hamleto



DU akvofosegoj kaj du levpontoj allasis min al la tragedia kastelo en Helsingør. La korpremo intensiĝis kaj en tiu etoso la fantaziaj kreitaĵoj de Shakespeare pli kaj pli nete korpigis. Kaj enirante en la kvadratan korton, kies solenon reliefigis verdkupraj tegmentoj kaj impona arkitekturo, nigrevestita, pala kaj melankolia, Hamleto, reĝido de Danujo akompanis min.

Jen la fortika terasa remparo: en feraj tempoj du soldatoj dum ventospira malhela nokto elvokas misteraĵojn.

“Halt’ ! kiu iras ?” “La reĝo vivu.” La dramo komenciĝas. Jen la subteraj labirintoj, kie eĥsonis sangaj proponoj kaj venĝaj ĵuroj. For, for de tiu loko en kiu ankoraŭ sin kaŝas le reĝa fantomo ! For de la tombejo, kie rikanas la kranio de Jorik, la amuzigisto ! Ni iras tra spirala ŝtuparo, preskaŭ mallarĝa fendaĵo inter ŝtonaj muregoj ; tie, supren kaj mal-

supren, milfoje sin trenis la dana princo : tie, li planis kaj prokrastis murdajn eventojn, akompanate de la fidela Horacio. “Ekzistas en ĉiel’ kaj sur la tero pli da aferoj, ol en la lernejoj instruas filozofoj, Horacio”.

Korteganoj promenis : la stulta Polonio, la babilemaj Rosenkranz kaj Guldenstern, la danda Osrik, la juna Laerto. Jen, la ĉambro de la reĝino : en ĝi la ploroj de Gertrudo miksiĝis kun la honto pro la senkompata memorigo de ŝiaj volupto, adulto kaj krimo. Ofelio, “ho, maja rozo, ho, infano ĉarma”, tre apude vivis malantaŭ kurtenoj kaj damaskoj korŝiran sorton. Ĉi tie maturiĝis la plej gravaj eventoj, de la teatra deklamado, dum kiu la reĝo kriis sian angoron ĝis la fatala skermado. Rigardu ! Hamleto, morte vundita, elsaltas kaj trapikas la reĝon per sangoguta rapiro kaj ankoraŭ devigas lin trinki la pokalon. “Nu, faru do, venen’, laboron vian”.

Venu, vidu, revu pri Kronborg, la Kastelo de Hamleto en Helsingør.

Gian Carlo Fighiera

Partoprenu en Eŭropa Radio Programo !

La franca radiostacio Paris-inter dissendas *ĉiusabate* de la 22-a ĝis la 24-a (M.E.T.) internacikarakteran elsendon kun la nomo :

Bonsoir l'Europe, ici Paris !

("Bonan vesperon, Eŭropo—
ĉi tie Parizo !")

Ĝi estas elsendo en kiu oni respondas al aŭskultantoj, kiuj deziras, ke oni dissendu muzikaĵon kun mesaĝo por amikoj el eksterlando. Tie oni uzas kiel ĉefan lingvon la francan kaj krome laŭ la nacieco de la postulanto kaj de la adresato, oni uzas diversajn naciajn lingvojn. Pro la alveno de kelkaj leteroj esperantlingvaj, kvinfoje oni disaŭdigis ankaŭ Esperante. Sed kvankam la Esperanta parolisto (spikero) insiste petis la esperantistan aŭskultantaron skribi multnombre al la direkcio de la Radio, bedaŭrinde tre malmultaj leteroj alvenis. *Tial konante bone la situacion surloke, ni konsilas al vi :*

(1) Se vi estas franco, skribu franclingve sed aldonante vian mesaĝon en Esperanto kaj petu deziratan muzikaĵon por *pluraj* amikoj el *diversaj landoj* (tio pleje devigas ilin uzi Esperanton !)

(2) Se vi ne estas franco skribu esperante, senkulpiĝante pro malbona kono de franca lingvo, petu deziratan muzikaĵon por *pluraj* amikoj el *diversaj landoj* kaj aldonu komunan mallongan esperantan mesaĝon por ili.

(3) Vi povas en viaj leteroj *modere* postuli ankaŭ Esperantajn kanzonojn (ekzemple ion el la repertuaro de la esperantista kabareto en Parizo : "La Tri Koboldoj") sed ne insistu kaj *neniam* petu, ke oni disaŭdigu *La Esperon* aŭ ion similan, kio interesus nur nin esperantistojn kaj tedus aliajn. Pli bone estus se tiusence vi sugestas al franca radio la starigon de speciala mallonga amuza esperantista programo, dediĉita nur al Esperantistoj tra la tuta mondo.

(4) Petu, ke oni enmetu en la komencajn salutojn de la elsendo ankaŭ Esperantan : "Bonan vesperon Eŭropo, ĉi tie Parizo !" same, ke oni enmetu adiaŭan vorton en Esperanto ĉe la fino.

(5) Vi povas peti, ke oni dissendu *regule* Esperante *ĉiusabate*, kaj ke oni anoncu ĉiun muzikaĵon, krom en franca lingvo, ankaŭ en Esperanto. Menciui, ekzemple, ke tio povus fari la plej grandan bonon al la franca lingvo.

(6) En viaj deziroj pri muzikaĵoj, plej bone estas, se vi elektas muzikaĵojn (klasikan aŭ modernan), kiuj plaĉas al la plejmulto de aŭskultantoj. Inter klasikaĵoj ni konsilas al vi elekti francajn komponistojn (Ravel, Debussy, Berlioz, kaj aliaj), ankaŭ Chopin revenas tre ofte, Beethoven, Mozart, Liszt, tre verŝajne ankaŭ slavaj komponistoj revenos nun pli ofte. Inter modernaj muzikaĵoj, vi povas eĉ ruze eviti la titolon de kanzono, kaj peti ekzemple nur, ke oni disaŭdigu ion de jenaj modaj francaj gekantistoj : Charles Trenet, Maurice Chevalier, Edith Piaf, Yves Montand, Mouloudji, Lucienne Delyle, Georges Brassens, "Les Compagnons de la Chanson", "les Frères Jacques", kaj aliaj.

(7) Konservu tiun ĉi artikolon, skribu plurfoje dum la tuta jaro, kaj estu kontenta se ĉiusabate vi aŭdas Esperantajn vortojn, eĉ se ili ne estas la viaj. Tio estu al vi instigo por skribi denove, kaj se oni ne dissendas regule Esperante, tio estu por vi ankoraŭ pli forta instigo por denove skribi kaj denove peti aŭ sugesti.

(8) Diskonigu en via grupo tiun gravan aferon, en kiu Esperanto estas praktike uzata flanke de ne-esperantistoj. Ne permesu ke tiu adreso dronu.

Jen la adreso al kiu vi skribu :—

Radiodiffusion française
Programme : "Bonsoir l'Europe, ici Paris !"
107, rue de Grenelle
Paris, 7

Konkurso rezervita al radioaŭskultantoj en eksterlando

La radioaŭskultanto loĝanta en eksterlando (ĝis 3,000 km. for de Parizo), kiu inter la 5a de novembro kaj la 31a

de decembro 1955 estos sendiginta fare de la plej multnombraj eksterlandaj aŭskultantoj (loĝantaj ĉu en lia propra lando, ĉu en aliaj landoj, krom metropola Francujo), laŭ la ĉi-sube difinitaj kondiĉoj, poŝtkarton aŭ leteron al la Produktantoj de la elsendo BONSOIR L'EUROPE . . . ICI PARIS, R.T.F. 107, rue de Grenelle, Paris 7-r, ricevos :

1e, Ir-kaj-revenan bileton peraviadilan (aŭ fervojan en unua klaso) por fari vojaĝon al Parizo.

2e, La repagon de siaj restad-kostoj en Parizo dum unu monato (aŭ dum 20 tagoj por du personoj) ĝis la sumo de 250,000 francaj frankoj.

Kvar aliaj premioj estos atribuitaj en formo de kvar vojaĝoj ir-kaj-revenaj peraviadile (aŭ pervagonare en unua klaso) kaj de la repago de siaj restad-kostoj ĝis 100,000 francaj frankoj por ĉiu el la gajnintoj, kiuj estos la plej proksimaj al la rekorda nombro atingita de la ĉefa gajninto.

Konsekvence, la procedo estas jena :

1e, La aŭskultantoj loĝantaj en eksterlando (ĝis 3,000 km. for de Parizo) devos sendigi fare de aliaj aŭskultantoj poŝtkarton menciantan :

(a) la precizan tempon de aŭskulto (kun horo kaj minutoj) laŭ horsistemo G.M.T. de la elsendo de muzikaĵo speciale dissendita por la konkurso dum la elsendo BONSOIR L'EUROPE.

(b) la nomon kaj adreson (per grandaj presliteroj) de la aŭskultanto, kiu petis ilin skribi.

2e, La aŭskultanto, kies nomo estos la plej ofte menciita sur la kartoj ricevataj de la Produktantoj de la elsendo BONSOIR L'EUROPE ricevos la unuan premion ; la kvar aŭskultantoj plej proksimaj al la nombro de la gajninto ricevos la aliajn premiojn.

3e, La kartoj senditaj de la aŭskultantoj devos esti enpoŝtigataj maksimume du tagojn post la dissendo de la muzikaĵo en la elsendo ; pruvo pri tio estos la poŝtstampo.

Jen la ondolongoj de la radio-stacio Paris-Inter :

sur longaj ondoj : 1,829 metroj

sur mezlongaj ondoj : 514 kaj 261 metroj

sur mallongaj ondoj : 49 kaj 31 metroj

Skribu al la adreso donita supre—kaj kompreneble, esperantistoj skribu en Esperanto !

Daniel Luez

Delegito de UEA en Laon (Franc.)

GRUPA VIVO

Eksteraj Rilatoj

Tiu ĉi ĉapitro rilatas al la ĝenerala propagando : rilatoj kun la Publikaj Instancoj, kun la politikistoj, asociestroj kaj gazetistoj.

(1) **Publikaj Instancoj.** Nia movado devas flankenlasi ĉiun politikan demandon. Sed ĝi devas prezenti kaj konigi Esperanton al la Publikaj Instancoj, ĉar nur ĉi tiuj povas decidi pri la publika disvastigo de nia lingvo. Nur ili povas konsenti al instruo de Esperanto en la publikaj lernejoj, kaj doni oficialan valoron al la diplomoj donitaj de niaj naciaj asocioj.

La Prezidanto de ĉiu grupo devas do daŭre rilati kun la membroj de la registaro de la regiono kaj devas resti en kontakto kun la urbestro de sia urbo. La gvidantoj de la lokaj grupoj devas do viziti, almenaŭ unu fojon ĉiujare, la reprezentantojn de la Publikaj Instancoj, tiujn de la Regionoj, tiujn de la urboj, kiuj ilin koncernas. Ili bezonas, efektive, ricevi permesojn por diversaj manifestoj de sia agado, pli malpli malfacile riceveblaj laŭ la landoj. Ili ankaŭ bezonas koni ilin por peti de ili monajn subvenciojn.

Pro tio, ili devas inviti ilin al ĉiu interesa manifestacio organizita en la urbo submetata al ilia administra povo. Oni havas tendencon preterlasi tiujn rilatojn, sed tiel agante oni perdas la eblecon, en multaj cirkonstancoj, antaŭenpuŝi kaj oficialigi nian movadon.

(2) **Politikistoj.** Oni neniam povas fidi plene al politikistoj, ĉar ĉi tiuj konsideras ĉiam unue la intereson de sia partio aŭ memprofiton. Nia

movado ne povas allasi sin al la direkto de iu ajn politika partio, ĉar se la partio fiaskus, la malaprobo atingus la esperantistan movadon.

Sed ni devas konigi Esperanton en ĉiuj politikaj medioj kaj provi konvinki iliajn reprezentantojn pri la bonega solvo, kiun ni proponas al la problemo de la lingvoj. Ni devas aŭdigi nian voĉon en la politikaj medioj, neniam dirante, ke nia movado apogas unu partion.

(3) **Privataj asocioj.** Ni devas utili por ĉiuj asocioj, same kiel por ĉiuj komercaj societoj, alportante al ili rimedon por rilati internacie kun asocioj kaj societoj de fremdaj landoj.

Sed tie ĉi ankaŭ, ni ne devas, rilate al la asocioj, aprobi publike la celon serĉatan de ili, kiam ili enmiksiĝas en la politikon.

Ni devas prezenti al ili nian solvon de internacia lingvo kaj faciligi al iliaj membroj la lernadon de Esperanto.

Ni rimarkigu, ke en ĉiu regiono, aŭ granda urbo, la grupoj devas indiki al la publiko la nomon kaj adreson de la persono al kiu ĝi devas sin turni por la traduko de esperantaj leteroj kaj dokumentoj. Tiuj tradukoj devas, kompreneble, esti pagataj, kiel por la aliaj lingvoj.

Al la komercistoj ni montru la jarlibrojn de UEA kaj konvinku ilin ke la esperantistoj estas utila klientaro, ke reklamo en nia bulteno

povas alporti profiton. Ni provu esperantigi hotelon kaj restoracion en nia urbo por eventualaj vizitantoj, aŭ kunvenoj. Kompreneble tiuj komercistoj devas apogi nian movadon.

(4) **Gazetistoj.** Tiuj rilatoj estas tre gravaj kaj se ili estas bone organizitaj, ili povas alporti seriozan helpon al la movado. La unua, plej grava, laboro estas prepari regulajn komunikaĵojn, uzante la informojn de la gazetara servo de UEA aŭ de la nacia asocio. Oni aldonu la lokajn novaĵojn, programojn de la klubo, informojn pri eksterlandaj vizitantoj, pri kursoj kaj ekzamenoj, kaj faru reklamon pri la perkoresponda kurso.

La respondulo povas proponi al gazetestro tradukon de interesa novaĵo legita en eksterlanda esperantista revuo, ne forgesante skribi je la fino, de kie venas la informo kaj ke ĝi estas traduko de esperanta artikolo.

Unu ekzemplero de ĉiu ĵurnalo kiu reprenis esperantistan komunikaĵon devas esti sendata al la estro de la Gazetara Servo. Ĉi tiu sendas monatan raporton pri tiuj represoj al la redaktanto de la nacia esperantista Bulteno, aŭ al la ĝenerala sekretario de la landa asocio. Tiu lasta sin apogos sur tiuj raportoj por starigi sian agadon en la lando.

Ni ĉiam memoru ke ni devas konigi persisteme nian movadon. J.G.



La traduko apartenas al la grandaj faroj de nia literaturo.

F. Szilagyi

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,

Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe

U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando

Belarta Konkurso **1956**

NI invitas la sepan fojon niajn verkistojn kaj artistojn konkuri en la *Belarta Konkurso*. Internacia komisiono prijuĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj kaj la prezento de la gajnintaj verkoj okazos dum la 41a Universala Kongreso en Kopenhago. Samloke okazos la prezentado de la ĉefpremia dramo. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion. La kvar branĉoj:

LITERATURA SEKCIO

1. **Originala poezio** (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj).
2. **Tradukita poezio** (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj).
3. **Originala prozo** (ĉiu prozaĵo maksimume po proks. 12000 literoj).
4. **Originala drameto** (ludodaŭro maksimume 25 minutoj).

Oni rajtas partopreni per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj laŭeble aperos en la organo "Esperanto" kaj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto. Skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj sur aparta slipo la pseŭdonimon kun via vera nomo kaj adreso, eventuale kun via kongres-numero aŭ kun membromarko de U.E.A. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo.

Pri aparta traduka branĉo informo aperos en la sekva numero.

ĜENERALAJ REGULOJ POR PARTOPRENO

1. Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 41a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de U.E.A. (ĉu rekte, ĉu per "adopto").

2. Sendu ĉion al la peranto, s-ro K. Lawrence, 244 Quinton Road, Birmingham 17, Anglujo. La peranto havas la devon konservi la anonimecon de la partoprenanto.

3. La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31a de de marto 1956 por la Literatura Sekcio.

4. Konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn

por unu aŭ pluraj branĉoj en unu sekcio): por britoj, 1 ŝilingo 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponon: 3 respondkuponoj (maldekstre stampitaj) aŭ malpli laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesita, la partopreno estas senpaga.

F. Szilágyi, Sekretario.

ENIGMAJ KONKURSOJ

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 97-a konkurso: S-ro A. C. Coutinho (Brazilo) 117, S-ro F. Soyeur (Belgujo) 113, S-ro H. Evers (Nederlando) 111 p.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 98-a konkurso: S-ro T. Raymar (Norvegujo) 120, S-ro J. Derieuw (Belgujo) 114, F-ino M. Marchand (Francujo) 111 p.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 99-a konkurso: S-ro J. Escaré (Francujo) 114, F-ino G. Thenée (Germanujo) 112, S-ro O. Persson (Svedujo) 106 p.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 100-a konkurso: S-ro T. K. Slade (Anglujo) 108, S-ro V. Marcone (Italujo) 110, S-ro F. Jelenc (Alĝerio) 110 p.

P. H. Mooy.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de

la plej famaj verkistoj

aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformata

jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto
2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Delegitoj kaj landaj
Perantoj de UEA

Redakcio:

7, Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine)

Francujo.

Administracio:

5, Bd. Stalingrad
Nice (A-M)

Belarta Konkurso 1955

Tradukita Poezio : Dua Premio

Dante Alighieri

Manfredi

El la tria kanto de Purgatorio

*“Kiu vi estas ajn” jen voĉ’ eksonis,
 “la kapon turnu vi dum via iro :
 memoru ĉu en mondo vi min konis.”*

*Mi turnis min al parolinta viro :
 li estis bela, blonda, nobel-dignis,
 sed unu brovon tranĉis glavoŝiro.*

*Mi lin esploris, fine mi rezignis :
 kaj li daŭrigis : “Nu, vi povas kredi.”
 Kaj montris vundon, kiu l’ bruston signis ;
 Ridete poste : “Estas mi Manfredi,
 nepo de Costanza imperiestrino.*

*En mondo vi por mi bonvolu pledi
 ĉe l’ filineto mia, origino
 de l’ Aragona kaj Sicila gloro,
 dirante veron pri la patrofino.*

*Mi min konfidis kun amara ploro,
 kiam, vundite, morton mi suspektis,
 al la pardon-inklina Di-sinjoro.*

*Teruraj pekoj tiam min infektis,
 sed granda estas Dio providenca
 por ĉiu, kiu al li sin direktis.*

*Se estus la ĉefpastro de Cosenza,
 metite de Klement’ je mia ĉaso,
 en Di’ leginta pri ĉi paĝ’ sentenca,
 ostaro mia post la viv-delaso*

*ankoraŭ estus apud Benevento
 ĉe l’ ponto, sub la granda ŝton-amaso.*

*Nun banas ĝin la pluv’ kaj movas vento
 kaj for de l’ Regno ĝi laŭ l’ Verde ŝimas,
 kien li portis ĝin dum noktsilento.*

*Malben’ ilia dian gracon limas :
 ni povas tamen savi nin je Dio,
 ĝis vivo kaj espero nin animas.*

*Kiu en la malben’ de l’ Eklezio
 transpasas, ankoraŭ se li pentas vere,
 atendas li for de l’ Purgatorio
 dum tridekobra temp’, ol kiam tere
 persisti volis li en la herezo,*

*se ne preĝadas hom' por li sincere.
Vi feliĉigas min per bonkomplezo,
se al Costanza mia vi indikas
pri ĉi renkonto kaj ĉi puno-pezo :
ĉi tie vivul-preĝo tre efikas."*

el la itala tradukis

Enrico Dondi

Se mi estus birdo . . .



1. /: Se mi estus birdo,
aŭ jen aeroplano, :/
/: mi vojaĝus fluge
preter la dogano ! :/

2. /: Se mi estus tamen
tiu ter-lumbriko, :/
/: rampus mi subtere
certe ĝis AFRIKO ! :/

3. /: Pro domaĝo granda
mi nur estas homo, :/
/: tial mi ja sidas
hejme sen la mono ! :/

Vortoj : St. Urban

Melodio : Dybych byla vtáčkem


Leonido Vasiljef

—70-jara

Nekredeblaĵo ! Ĉu vere jam 70 ? Ni opiniis, ke k.t.p.—tion oni aŭdas ordinare, se oni parolas pri homoj atingintaj sufiĉe altan aĝon, sed tio estas fakto. Nia “maljunulo” Vasiljef, kiu ankoraŭ estas plena de energio kaj varmo de junulo, oficiale anoncis en siaj amikaj rondoj, ke li fariĝis la 13/9 de 1955 sepdekjara !

Ni petis unu el liaj multaj amikoj rakonti ion pri lia kariero. Kiel malgranda knabo li deziris fariĝi pastro de la rusa grekkatolika eklezio, kaj jam komencis prepari sin al tio. Li studis en klasika gimnazio en St. Petersburgo (nun Leningrado). Li estis devigata studi 2 “novajn” lingvojn (franca kaj germana) kaj 3 “antikvajn” : (latina, greka kaj tiel nomata ekleziaslava lingvo (la lingvo, en kiu okazis la diservo en la grekkatolika eklezio en malnova Ruslando).

Li teruriĝis pri la lingvaj studoj vidante la dikajn vortarojn kaj treege malfacilajn kaj nelogikajn gramatikojn de tiuj ĉi lingvoj ! Renkontinte en sia aĝo de 15-jara knabounuafoje la lingvon Esperanto, li kiel li mem diras “enamiĝis” en ĝin ! La logikeco de la gramatiko kaj malgrandeco de la vortaro kaj ĝenerale la facileco de la konstruo de la lingvo faris tion, ke li konvinkiĝis pri la neceso de tia lingvo, tuj eklernis ĝin laŭ la Zamenhofs “Ekzercaro” kaj tuj post la “Ekzercaro” li komencis legi la “Fundamentan Krestomation”. En tiu periodo apenaŭ ekzistis iu alia lernolibro de Esp. en rusa lingvo, kaj tio estis tute ordinara metodo por lerni la lingvon. Oni povas trovi



lian nomon inter la unuaj 10.000 nomoj de personoj, kiuj promesis ellerni la lingvon Esp. kaj uzi ĝin, se krom la subskribinto aliaj homoj en kvanto de 1 miliono ellernos la lingvon.

Li estis la kunfondinto de la dua Esperanto klubo en St. Petersburgo (La unua Esp.klubo estis pro politika suspekto fermita de la polico.) Li vigle partoprenis en la kluba laboro kaj jam kiel juna studento fariĝis konsulo aŭ vicdelegito de UEA en St. Petersburgo en la jaroj 1910–1914.

En la jaro 1914 li partoprenis en la unua mondmilito kaj dum la unuaj monatoj de la milito li fariĝis militkaptito kaj estis transportita al la tendaro por rusaj militkaptitoj. Dum unu jaro li estis en Aŭstrujo, kaj dum 1½ jaro—en Hungarujo. (En tiu tempo ambaŭ landoj apartenis al la sama regno.) En la militkaptitejo de Aŭstrujo—pere de UEA en Ĝenevo—li sukcesis ŝiigi la ĉefoficejon de UEA pri sia sorto, kaj UEA tuj helpis al li informi liajn parencojn en Ruslando pri lia sorto, alie lia familio kredus, ke li estas mortigita

ĉe la fronto. Tial li por ĉiam konservis fidelecon al UEA, kaj lia ĝojo estis tre granda kiam pli poste UEA kaj IEL kuniĝis !

Li estis inter kelkcent rusaj militkaptitoj, kiujn oni sendis pere de la "Ruĝa Kruco" al neŭtrala lando (Danlando) por resaniĝo. En Danlando, kien li alvenis en la jaro 1917 (antaŭ la fino de la unua mondmilito) lin renkontis lingva malfacilaĵo en formo de la dana lingvo, lingvo kiu sonis terure en la oreloj de la rusoj ! Sed denove Esperanto tuj helpis al li. Ne sciante, ĉu ekzistas iu Esp. klubo en Kopenhago, li tamen skribis poŝtkarton al "Esperanto-klubo", Kopenhago, kaj li tuj ricevis la respondon de la klubo, kaj post kelkaj tagoj 5-6 danaj samideanoj el Kopenhago kune kun unu sveda samideano vizitis lin en la tendaro. (Unu el la danoj estis "la patrino de la esperanta movado" en Danlando, F-ino M. Noll !) Tiamaniere li ekinterrilatis kun la danaj samideanoj. Li certe tute ne pripensis tion, ke Danlando fariĝos lia dua patrolando, kaj ke ĝuste en tiu ĉi lando li renkontos homon, kiu fariĝos lia bona amiko, kaj kiu kondukos lin al Kristo.

Tio okazis jenamaniere. Iun tagon iu dana teologo vizitis la tendaron. La nomo de tiu teologo estis tre konata en Danlando, kaj eksciinte, ke Vasiljef estas esperantisto, li esprimis deziron eklerni Esperanton kaj proponis ke Vasiljef instruu lin. Li promesis mem aĉeti la lernolibron, kaj al la unua leciono li alportis "La novan testamenton" en esperanta traduko ! Vasiljef kompreneble forte protestis, dirante ke tio ja ne estas lernolibro, sed li protestis eble ĉefe pro tio, ke li en tiu tempo estis

ateisto. La lernanto tamen insistis pri la taŭgeco de la Nova Testamento por tiu celo, ĉar li jam posedis la N.T. en kelkaj aliaj lingvoj, kaj preskaŭ parkere konis ĝian enhavon, sed nun li deziris aŭdi la ĝustan prononcadon de Esperanto.

Ĉu vi povas prezenti al vi la strangecon de tiuj lecionoj. La lernanto estis treege ruza kaj elektis el la Nova Testamento ĝuste la vortojn, kiuj tuŝis la konsciencan de la instruisto, kaj post unu el tiaj lecionoj la instruisto devis konfesi, ke li bezonas helpon de Dio kaj konvertiĝis al Kristo !

Post kelkaj monatoj la lernanto kaj la instruisto aranĝis grandan planon por la prelegvojaĝo tra la tuta Danlando, dum kiu ili faris pli ol 80 prelegojn vizitante preskaŭ ĉiujn danajn urbojn. La prelegoj okazis kompreneble en Esperanto kun traduko al la dana lingvo de la "ekslernanto". Tio estis bonega propaganda por Esperanto, ĉar multaj danaj gazetoj skribis referatojn pri tiuj prelegoj, ĉar Vasiljef ja rakontis ion pri siaj travivaĵoj dum la milito kaj dum la tempo de sia militkaptiteco, kaj dume la milito ankoraŭ daŭris. Do la temo estis tre aktuala. En la postaj 20 jaroj Vasiljef gvidis multajn Esp. kursojn en Kopenhago kaj provinco. Li speciale klopodis enkonduki Esperanton en la kursoj aranĝataj de la komunumoj mem, kaj li sukcesis fari tion en kelkaj lokoj.

Dum la pasintaj 6 jaroj li estis prezidanto de Kristana Esperanta Ligo Internacia (KELI) en Danlando kaj faris multajn bibliajn studojn en Esperanto kaj en Danlando kaj en aliaj landoj, kie okazis UEA-kongresoj.

Nova gramofona disko

Interesa, frapa pruvo pri Esperanto

Aperis gramofondisko kun la salutparoloj de 23 diversnaciaj reprezentantoj en la Jubilea Kongreso de Esperanto en Bologna.

UEA eldonis tiun diskon por ke la esperantistoj kie ajn en la mondo havu eblecon lasi siajn amikojn, siajn konatojn, la indiferentulojn, la skeptikulojn kaj la kontraŭulojn aŭskulti kiel sonas esperanto parolata en kongreso.

Oni ofte renkontas personojn, kiuj deklaras: Esperanto ne taŭgas kiel internacia lingvo, ĉar diverslandanoj certe elparolas tiun lingvon same diference kiel la latinan lingvon, kaj sekve reciproka kompreno per esperanto estas neebla. Se esperantisto kontraŭdiras, dirante ke la lingvo estas uzata kaj komprenata en niaj internaciaj kongresoj, la skeptikulo kutime kredas tiun aserton pura mensogo, ĉar li simple ne *volas* aŭ ne *povas* kredi.

Sed nun ni havas je nia dispono atestilon, kiun neniu povas ignori. Dum la Jubilea Kongreso en Bologna S-ro *Vilho Setälä* per magnetofono kaptis la voĉojn de la parolantoj. Kaj tiun magnetofonan rubandon ni kopiis sur gramofonan diskon, laŭ afabla permeso de S-ro Setälä kaj kun same afable helpo de S-ro *Bengt Joelsson* en Stockholm.

La disko estas plej frapa pruvo pri la uzebleco de esperanto, pri ĝia klareco, pri ĝia esprimriĉeco kaj pri la unueca elparolo de ĉiuj parolantoj. La disko sekve estas unika propagandilo por esperanto. Samtempe ĝi estas plej bela memoraĵo por tiuj, kiuj partoprenis la Jubilean Kongreson, kaj same interesa dokumento por tiuj kiuj ne povis ĉeesti.

Vi bezonas la gramofonan diskon

Universala Kongreso de Esperanto

Bologna 1955 Salutparoloj

por via propra plezuro kaj por konvinki viajn konatojn pri Esperanto
Speco de la disko: 45 r.p.m., t.e. po 45 turniĝoj en unu minuto
Nerompebla Diametro 90 mm. *Prezo 5 guldenojn.*

Mendu ĉe **Universala Esperanto-Asocio**

Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando

VERAJ AMULET-REMEMORIGAĴOJ

de Afriko.

Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la forsendado rekte al vi kostas nur 5 ŝil., unu 1 dolar-noton aŭ egalvaloron. Aĉetu hodiaŭ, kiam ili ankoraŭ estas aĉeteblaj.

E. L. Heilberg, Poste Restante, KITWE, Nr. Rodezio, Centra Afriko.

J. Ribillard

Vagado sub palmoj (5)


Colomb-Bechar

Blankaj Kepoj

NE transiras la relvojo. Ĉi tie komenciĝas Saharo. La longforma oazo, kies palmoj speguliĝas en senvivaj marcetoj, sterniĝas meze de la orkolora dezerto, kvazaŭ kolringo el jado ĵetita sur krudan silkaĵon.

En la ombro kaj silento, ŝirmite per siaj brunaĉaj kaj altaj muroj, la araba vilaĝo enŝlosas sian misteran ekziston. Tra ogiva pordego eniras fermienaj nomadoj kun kurba ponardo sub sia burnuso el dromedara lano. Senbrue paŝas kelkaj virinoj volve kovritaj per blanka tolaĵo, kvazaŭ fantomaj siluetoj. Sur la pure blua ĉielo, kiel arĝenta sago, flugas al Gao la kurieraviadilo, kies okcidenta rapideco kontrastas kun la kvieta movetado de tiu mondo duone perdita en la sabloj.

Tute blanka, kun sia provinca vizaĝo, la eŭropa urbeto ŝuldas sian prosperon al la soldataro, kiu de tie antaŭgardas la saharajn limregionojn kontraŭ la agitemaj berberaj nomadoj, rabistoj pro bezono kaj hereda inklino. Alveturinte de Oran post dudekkvarhora vojaĝo, vi ekvidas miniaturan stacion, kiu vekiĝas tri fojojn ĉiusemajne, kiam vagonetareto, simila al infana ludilo, vizite venas al la Pordo de la Dezerto. Ekstere vi vin trovas antaŭ vasta kaj nuda placo. Dekstre staras kazernoj kun siaj ĉevalstaloj sonantaj pro hufbatoj kaj alvokoj, al la civita policejo kun sia pitoreska spaliro el indiĝenaj pledantoj dormemaj sub siaj truplenaj vestaĉoj, la oficira klubo kun ties naĝo-baseno, kaj eta preĝejo, kie meson celebras longbarba pastro. Poste la komandpalaco, eks-Citroen-Hotelo, kun sia




gvardio en parada uniformo, la tendaroj en kiuj kampas la militista pasloĝantaro, kaj pli malproksime la aviadilejo.

Dum duona jaro la garnizono “paroligas la pulvon”, kiel diras la araboj, en la direkto de la suda Maroko, protektas la karavanojn revenantajn de la “daktillando”, aŭ postkuras hordon de nomadaj bandistoj. Tiam dormetas la malplena urbo. Sed ekde la reveno de la militistaro ĝi vigliĝas, bruas, eĉ foje tumultas en sia “varma” kvartalo. Antaŭ la loĝietoj de la belaj knabinoj kun kolorŝminkitaj okuloj vagadas altstaturaj kavalerianoj kun ruĝa aŭ blua burnuso, arabaj fuzileroj kun turbano kaj ruĝa zono, francaj pioniroj kun kasko el korko, aviadistoj kun brodita kasketo, soldatoj el la fama Fremda Legio kun blua zono kaj blanka kepo . . . la lastaj dungitaj militistoj.

La Fremda Legio formas altvaloran falangon el bravuloj, soifantaj al aventuroj, novaj horizontoj kaj ekzotaj amludoj. Ĝi estas haveno por la malĝojaj amantoj serĉantaj kompensan forgeson, la flirtanimaj vagemuloj postkurantaj kaprican ĥimeron. Rompinte kun sia pasinta ekzisto, tiuj viroj definitive sin donas al sia nova patrujo, kies insigno estas sepflama grenado, kaj scias ke se necese, ili por ĝi tutoferos sian vivon. Sub la blanka kepo anonime kuntroviĝas princoj kaj ŝtelistoj, poetoj kaj inĝenieroj, muzikistoj kaj maristoj, el ĉiuj landoj, klasoj kaj rasoj. El tiu heterogena sennaciularo severa disciplino forĝas unu solan animon, tiun de la Legio, la plej bona soldataro en la mondo.

Por iĝi legiano oni ne bezonas prezenti pasporton, oficialajn dokumentojn aŭ pagateston de la kolektisto. Sufiĉas esti juna, bonsana, forta kaj deklari, ke oni sin nomas X . . . aŭ Y . . . , naskita ekstere de Francando. Kiam la novulo interŝanĝas sian civilan vestaĉon por surmeti la okrokoloran kostumon kun la ruĝaj kaj verdaj epoletoj, li samtempe rezignas sian propran memecon kaj metamorfoziĝas en fikcian individuon, kies anonimeco estos ĉiam respektata. Ĉiu legiano, kia ajn estas lia origino, ŝajnas en la okuloj de supraĵaj observantoj persono eltirita el romano aŭ filmo, kun aŭreolo de nedifinita mistero, kiu forte impresas la kontoristojn kaj vartistinojn. Kompreneble pri li disvastiĝas romantikaj legendoj al la oreloj de la fabelamatoroj.

Iun tagon en Colomb Bechar alvenis renoma informisto allogata de tiu legenda famo, dezirante verki ĉefartikolojn, kiuj nepre sensaciigos ĉe la limfatismaj hejmuloj kaj sentimentalaj kuiristinoj. Li loĝis en hotelo ofte vizitata de niaj herooj, kaj preparis plumon kaj paperon. Ĉe la vesperiĝo, je la libertempa horo de la soldataro, li zorge elektis taŭgan lokon sur la antaŭkafejo, kaj atendis la aventuron. Ĉi tiu trafis lin en formo de du trinkemaj kaj senmonaj legianoj. La romanisto afable invitis sensoifiĝi. La du “korsaroj” ekkaptis la okazon kiel elĉerpema araneo sin ĵetas sur sencerban muŝeton. Malpleniginte tri glasojn da alĝeria anizlikvoro, laŭdezire densa kaj glaciigita, ili konsentis rakonti la historion de sia vivo. Unu, blonda kaj nostalgia kiel stepo, estis rusa princo, ekskolonelo de la imperia gvardio, kiun granda dukino senbride amis senkaŝe al la tuta Kortego. Skandalo, forkuro, vaporŝipo, alitransformiĝo : nun legiano Popov. La alia, bruna kaj vivoplena kiel kaprido el Sicilio, estis timiga konspiranto post-



kurata de la internacia policaro. Dinamito, forkuro, vaporŝipo, alitransformiĝo: nun legiano Stromboli. Tiun vesperon nia bonŝanca verkisto kovris tri paperfoliojn kun ĝoja facileco.

La sekvintan tagon du blankaj kepoj senmalice promenante gastis ĉe la diligenta kronikisto, kaj per helpo de pluraj ĝisrande plenaj glasoj da ruĝa vino malkaŝis sian veran biografion. Tiuj estis irlanda “sinn-feiner” forsavita de la maŝo, kiun al li proponis la ekzekutisto de Lia Reĝa Moŝto, kaj hungara grafo, kiu senrevene ludperdis dekkvin vilaĝojn en la salonoj de Monte Karlo. Venko. Jen glora trofeo!


Postmorgaŭon, kvar elegantaj vinelsuĉuloj malplenigis kelkajn flakonojn honore al la franca literaturo, detale konfidante siajn aventurojn. Tie estis altabligitaj: nigra eksreĝo fuĝinta la avidecon de siaj kvardek ok edzinoj, sudamerika eksguberniisto senlabora pro revolucio, bavara artopentristo persekutita de Hitler kaj juda bankrotinto el Lisbono. Kuris la plumo sur la veleno!

Sed la kvaran tagon dekduo da gajaj veteranoj kun sponga gorgo laŭvice atendadis, kvazaŭ apud konfesejo, ĝis estos libera loko ĉe la akceptema tablo por interŝanĝi siajn intimajn memoraĵojn kontraŭ kruĉeto da malvarmeta “beaujolais”. Abunde riĉiĝis la kajero per mirindaj anekdotoj; sed finfine ĉesis tiuj agrablaj momentoj, kaj necesis foriri. Kun valizo plenplena de veremaj kaj emociaj dokumentoj nia fama aŭtoro reveturis Parizon, kaj pli poste publikigis sian rimarkindan verkon, kiu grande sukcesis en 1933.

Bedaŭrinde nur kelkaj feliĉuloj profitis de tiu beletra kometo. Mankis la tempo—eble ankaŭ la mono—por tralavigi la tindran gorgon de ĉiuj, kiuj embuske atendis liveri al Klio siajn epopeajn sekretojn. Netrinkinte postrestis tri rotoj en plena kiomo, kiuj protestis kontraŭ tia maljusta sorto kaj vane kriis sian mizeron al la ventoj de la Dezerto.

Ho! Vergilio, vi kiu opiniis neperfekta vian senmortan Eneidon, laŭ kiaj tonoj vi kantis tiujn kuriozajn heroaĵojn por ĉiam nekonotajn. Sed, kiel dirus la saĝulo, kontentigi ĉiujn kaj Dion, oni ne povas.

beaujolais : bongusta vino produktata apud Burgondujo.



Radio


Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglántier, 29 Bd. Murat, PARÍS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Dimanĉo	23.00–23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.45–23.00	Hilversum. 402m. P. N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur unu fojon ĉiumonate).
Mardo	01.15–01.30	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.50–15.00	Ljubjana. 327m., 211m. K. Radio Ljubjana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur.
	19.00–19.15	Stockholm. 42m., 25.63m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo, Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
Merkredo	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m. P.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.55–18.10	Roma. 50.34m., 41.15m., 30.90m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m., 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Vendredo	22.45–23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	01.15–01.30	San José. Kiel marde.
	17.55–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 370m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.7m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	18.45–19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2.XII, La Radio kaj la blinduloj ; 7.XII, Jubileo de la Roma Esperantista Grupo ; 9.XII, Leterkesto kaj bibliografio ; 14.XII, Novaĵoj el Italujo ; 16.XII, Italaj turismaj urboj Massa kaj Carrara ; 21.XII, Honorigoj al Zamenhof ; 23.XII, Kristnasko ; 28.XII, Romo dum Vintro ; 30.XII, Finjaro kaj Novjaro.



Nekrologo

Bernot. Post longjara malsano forpasis en Ljubljana la 20an de septembro, en sia 76a jaro, Zvonimir Bernot, emerita ĵurnalisto, bone konata al malnova esperantista generacio kiel progresema kaj revoluciema batalanto por justeco kaj por Esperanto. Li estis kunfondinto de E-societo en Ljubljana antaŭ tri jardekoj.

Camuffo. Mortis neatendite en Trieste, la 22an de oktobro 1955, prof. Armando Camuffo, instruisto, veterano (1911), UEA-Delegito, Direktoro de la loka Katedro de E., membro aŭ estrarano de pluraj Asocioj.

Innitzer. Dimanĉe la 9an de oktobro, 10 tagojn post operacio, mortis Kardinalo d-ro Theodor Innitzer, ĉefepiskopo de Wien, Aŭstrujo. Ne nur tuta Aŭstrujo perdis sian ĝenerale altŝatatan patrecan ĉefepiskopon, sed ankaŭ Esperanto perdis sinceran amikon. Jam en 1936, dum la 28a U.K., li celebris la oficialan kongresan Diservon. Li ankaŭ estis kuratora membro de la Internacia Esperanto-Muzeo. *In Caritate Servire* estis lia episkopa devizo, kaj laŭ ĝi li ĉiam agis. Li fondis ekz-e "Helpkomitaton por ne-arjaj kristanoj", kiam Aŭstrujo estis aneksita de la nazioj, sed same li helpis laŭkonfesiajn hebreaĵojn. Li estis vere episkopo de la popolo, ankaŭ de la esperantista popolo, kiu lin ne forgesos kaj lin honoros en sia memoro.

Mariano de la Inglesia. La 6an de oktobro mortis nia kara madrida samideano, Inĝ. s-ro Mariano de la Inglesia.



Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Cardoso. Al niaj amikoj Paulo Amorim Cardoso kaj Mires Meireles Cardoso en Fortaleza, Brazilo, naskiĝis la 20an de septembro filino Altair Meireles Cardoso.

Love. Al ges-roj C. G. Love en Wolverhampton, Anglujo, la 27an de septembro, filino Dorothy Marion.

Tytgat-De Ketelaere. Al geedzoj Carlos kaj Paula Tytgat-De Ketelaere, membroj de la Grupo Verda Stelo en Antverpeno, ĝojige naskiĝis filino Kristin, la 22an de septembro, avigante nian amikon M. de Ketelaere.

Geedziĝoj

Grdanoviĉ - Ursic. La 2an de julio geedziĝis en Anglujo s-ro Ljubo Grdanoviĉ kaj f-ino Vlasta Urŝić. Ilia nova adreso: 10 Richmond Terrace, Shelton, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo.

Jacques-De Ketelaere. Geedziĝis je la 29a de oktobro s-ro Hugo Jacques kaj f-ino Henny De Ketelaere, profesorino de Esperanto kaj filino de la eks-ĉefdelegito de UEA por Belgujo, s-ro M. De Ketelaere. Ambaŭ estas membroj de la Grupo La Verda Stelo en Antverpeno.

50-jara Jubileo

La prezidanto de Saarlanda Esperanto Asocio, s-ro August Omlor, supera distrikta prokuroro, nun en emerito, aliĝis al Esperanto en la jaro de la unua universala kongreso en Bulonjo. Li baldaŭ fariĝis fervora pioniro de nia lingvo, skribante varbartikolojn kaj aranĝante paroladojn kaj kursojn. Jam en 1911 li fariĝis delegito de UEA. Nur la du militoj interrompis lian varbagadon kaj ankoraŭ nun li senlace gvidas la Esperantoaferon ĉe Saar.

Serio de 6

Kristnaskaj Kartoj

en poŝtkarta formo,
presitaj en

verda, nigra kaj blanka koloroj.

Po 3p., por la serio 1ŝ. 6p.

Mendu ĉe U.E.A.,
Eendrachtsweg 7, Rotterdam C,
Nederlando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Administra Oficejo : Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., Nederlando

OFICIALA INFORMILO

N-ro 277

1a 2-an de Novembro 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de oktobro 1954 :

	1954	1955
Asociaj membroj ..	8873	9754
Individuaj membroj :		
MJ 1001		950
MA 3926		3947
MS 729		821
Pat. 7		9
DM 277		291
HM 59		58
	5999	6076
	14872	15830

DELEGITOJ :

Belgujo

Mechelen. D : vakas.

FD (Juro) : vakas.

Verviers. FD (Turismo) : S-ro Jules Koeune, 17 Rue Courte du Pont.

Brazilo

Bajé. D : S-ro Correia Severo, dentkuracisto, Caixa Postal 369, Av. General Osório 1737.

FD (Religio) : La D.

Fortaleza. FD (Religio) : S-ro Paulo Amorim Cardoso, instruisto, rua Pedro I, 1106, Poŝtkesto 883 (Ceará).

Maceiô (Alagoas) : FD (Juro) : S-ro José Jeronymo de Albuquerque, juĝisto, Rua do Imperador 256.

Pelotas (R. G. do Sul). † FD (Sennaciismo) : S-ro G. R. Ledon, desegnisto, rua Bento Martins 371.

Recife (Pernambuco). VD : S-ro Amaro Pinangé Soares, presejestro, Caixa Postal 421, tel. 7471.

Sao Paulo. FD (Kemio) : S-ro Cicero Pimentel, kemiisto, R. Alves Guimaraes, 361.

Volta Redonda (Estado do Rio de Janeiro). D : S-ro Alberto Flores, Rua 4, no. 286, tel. 1395.

FD (Siderurgio) : La D.

Britujo

Glasgow. FD (Religio) : S-ro Hugh Martin, pastro, "Lilybank Cottage," Glenshee Street, E.1.

London. VD : Vakas.

Southampton. VD : Vakas.

FD (Komerco) : Vakas.

Welwyn Garden City (Herts). VD : Vakas.

Danlando

Horsens (Jylland). FD (Turismo) : S-ro A. P. Olesen, eksŝtatoficisto, Vestergade 90.

København. FD (Librotenado) : S-ro Benny Nielsen, revizoro, Malmøgade 12, 3 tv.

FD (Spirit-scienco) : S-ro P. Zacho, instruisto, Randbølvej 4, F. Tel. DA 9082.

Sønderborg (Als. Sønderjylland). D : S-ro S. C. Bork, poŝtisto, Grundtvigsalle 126.

Francujo

Arles sur Rhône (B. du Rh.). VD : Vakas.

FD (Fervojistaj aferoj) : Vakas.

Dieppe (Sne Mne). D : S-ro Robert Rétault, fervojisto, Bureau des Renseignements, Gare Maritime.

Hyères (Var). D : S-ro Maurice Feneyrol, radio-teknikisto, Radio-Stelo, 15 rue de la République.

Istres (B. du Rh.). D : S-ro P. Métivier, ĝardenisto, "Les Tartugues".

Ivry-sur-Seine (Seine). FD (Numismatiko) : S-ro M. Delcourt, Komerca direktoro, "Chocolat Vinay", 45, rue Gabriel Peri.

Jonzac (Charente-Maritime). D : S-ro J. Mathieu-Leroy, juĝisto, Tribunal-Jonzac. Tel. 207.

Germanujo (Orienta)

Pirna (DDR, Sachsen). D : S-ro Paul Glöckner, komerca instruisto emer., Damaschkestr, 24, Pirna-Copitz.

Germanujo

Weiden (13a) (Oberpfalz). VD : S-ro Hans Stahl, Supera poŝtsekretario, Pestalozzistr. 4/I. Tel : 2481/40.

FD (Korespondado) : La VD.

Hispanujo

Barcelona. FD (Komerco : kristalo kaj porcelano) : S-ro Rafael Ayala, komerca agento, Avda Glmo. Franco, 243-4-1-a. Tel : 315764.

Madrid. VD : S-ro V. Monsalve Cruz, kostkalkulisto, Paseo Delicias 150, 3°, A. Tel : 395703.
FD (Statistiko) : La VD.
FD (Kursgvidado) : S-ro R. Pin Garcia, Méndez Vigo 4.

Italujo

Alghero (Sardegna). D : F. ino D. Zedda, instruistino, Via Mazzini 15.
FD (Instruado) : La D.

Azzano Decimo (Udine). D : S-ro Silvano Manias, instruisto, Via Roma 2.

Bologna. FD (Abelkulturo) : D-ro O. Nanni, inĝeniero, Via Vittorio Putti no. 26 (319). Tel : 27289.

Bolzano. D : S-ro A. Zorzi, fervoja pensiito, Via Zancani 14-2.

Bosa (Sardegna). D : D-ro Edgard Scherer, kuracisto, Corso Vittorio Emanuele II.

Campobasso. D : D-ro A. Fusco, kuracisto, Viale Elena 58. Tel : 5134.

Firenze. FD (Framasonismo) : S-ro A. Tognetti, eksĉefoficisto fervoja, Via G. F. Pagnini 18. Tel : 44108.

FD (Medicino) : D-ro L. Maestro, okulisto, Via Guglielmo Marconi 82. Tel : 53777.

FD (Pentroarto) : S. ino Rina Tilli, Via Cristoforo Landino 12. Tel : 43328.

Genova. FD (Lingvoj) : vakas.

Grosseto (Toscano). D : F-ino Lydia Senes, oficistino, Via Garibaldi no. 15. Tel : 2934.

La Spezia. D : S-ro A. Rossino, pensiito, Via Torretto 6.

Livorno. D : S-ro P. Stoduti, instruisto, Via E. Zola 9.

Milano. VD : S-ro P. Marelli, teknikisto, Piazza Napoli 40. Tel : 479500.

FD (Scienco) : La VD.

FD (Muziko) : Prof. A. Trevisan, muzikisto, Via Giambologna 1. Tel : 384016.

Modena. D : Prof. M. Lago, Kat. pastro, Viale Storchi 249. Tel : 23153.

Sassari (Sardegna) : FD (Folkloro) : S-ino G. Curti, oficistino, Via G. Asproni 6. Tel : N.4288.

FD (Instruado) : Prof. G. Chiarini, Via Principessa Maria 60. Tel : 3600.

Torino. FD (Turismo) : S-ino A. Giroldi, librotenistino, Via Maria Vittoria 21.

FD (Administrado) : vakas.

Torre Pellice (Torino). D : S-ro T. Contino, instruisto, Piazza Stazione 1.

FD (Literaturo) : La D.

Trieste. FD (Astro-kirozofio) : S-ro R. Damiani, oficisto, Via Carducci 12/III. Tel : 31768.

FD (Komerco : vino/likvoro) : S-ro M. Renner, komercisto, Viale Miramare 17. Tel : 29680/33082.

Varese (Lombardia). VD : S-ro G. Caraffa, inĝeniero/instruisto, Viale Tamagno 19. Tel : 26211 (hejmo). Via Sacco 14. Tel : 25081 (Laborejo).

Jugoslavio

Novi Sad. D : S-ino V. Ignjatović, kand advokatino, Illje Ognjanovića 1.

VD : S-ino D. Aranicki, oficistino, Ilje Ognjanovića 1.

Pula (Istra). VD : S-ino M. Mirković, bankoficistino, Trg Bratsva Jedinstva 5. FD (Arbarkulturo) : Inĝ. O. Zunko, forstisto, Poštferko 116. Tel (oficejo) : 284.

Vinkovci (Hrvatska). D : S-ro J. Babić, pensiita oficisto, Radniĉka 10.

Zagreb. FD (Instruado) : Prof. F. Novljan, emerita gimnazia direktoro, Badaliĉeva 9 a.

Nederlando

Rotterdam. FD (Sennaciismo/Pacismo) : S-ro A. W. Treurniet, kontoristo, Noorderhavenkade 76 c. Tel : 85843.

Norvegujo

Kristiansund N. (Normöre). VD : S-ro Leif Björshol, bankoficisto, Clausensgaten 20 B. Tel : 3294.

Sarpsborg (Ostfold). FD (Lingvoj) : J. H. Rosbach, lektoro, Karl Johansgt, 10.

Polujo

Warszawa. D : Mag. T. J. Michalski, Szwolezerow 4-81. Warszawa 36. FD (Filozofio) : La D.

Portugalujo

Lisboa. FD (Filatelo) : S-ro Bigotte de Almeida, licea profesoro, Rua Actor Vale 16,-1.E.

Svedujo

Börlänge (Dalarna). D : S-ro M. Jansson, leterportisto, Soltorget, 2A. Tel : 15298.

Svislando

Arbon (Thurgau) : FD (Teksaĵ-maŝinoj) : vakas.

NOVA KOMITATANO :

Maertens, S-ro G. Pr. Leopoldstraat 51, Sint Kruis, Belgujo.

EKSIĜINTAJ KOMITATANOJ :

Van Gindertaelen, D-ro T., Raghenoplaats
9, Mechelen, Belgujo.
Vermaas, F-ino M. H., Nieuwe Binnenweg
70, Rotterdam, Nederlando.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955

784. Downex, D-ro T. E., Rio de Janeiro, Brazilo
785. de Araujo Goes, S-ro G., Juiz de Fora, Brazilo
786. Cavalcanti, S-ro A., Pernambuco, Brazilo
787. Kelety, S-ro L., Villa Carlos Paz, Argentino
788. Iglesias, S-ro E., Buenos Aires, Argentino
789. García Blázquez, S-ro F., Caracas, Venezuelo
790. de Abreu, D-ro M. B., Rio Pardo, Brazilo
791. Carvalhal, Alvaro Claudiano, Salvador, Brazilo
792. Nunes Leal, D-ro S., Resplendor, Brazilo
793. Robinson, S-ro C., Leeton, Aŭstralio
794. Reuben, S-ro R., Belo Horizonte, Brazilo
795. Tršar, S-ro D., Dol Logatec, Jugoslavujo
796. Vogel, S-ino M., Stuttgart, Germanujo
797. Schütt, S-ro H., Hamburg, Germanujo
798. Böhmke, S-ro P., Wiesbaden, Germanujo
799. Mielke, S-ro H., Berlin, Germanujo
800. Erbredda, S-ro M., Bienne, Svislando
801. Tóth, D-ro V., Budapest, Hungarujo
802. Goiveia, S-ro R., Rio de Janeiro, Brazilo
803. Gaio, S-ro J. M., Rio de Janeiro, Brazilo
804. Knoedt, S-ro L. H., Salvador, Brazilo
805. dos Santos, S-ro L. M., Rio de Janeiro, Brazilo
806. Domingues de Sá Fortes, S-ro M., Perdoes, Brazilo
807. Rodrigues, S-ro O., Rio Pomba, Brazilo
808. Augusto, S-ro S., Manaus, Brazilo
809. Thomaz, D-ro L. S., São Paulo, Brazilo
810. Vieira, S-ro E., Pindamonhangaba, Brazilo
811. Avila, S-ro J., Rio de Janeiro, Brazilo
812. Bador, F-ino, Tarbes, Francujo
813. Fernández Alvarez, S-ro J., Oviedo, Hispanujo
814. Zagradišnik, S-ro F., Trbovlje, Jugoslavio

815. Vugrinec, D-ro Ž., Sl. Požega, Jugoslavio.
816. Childress, S-ro C. W., Lolita, Usono.
817. Jorge Cordeiro, S-ro João, Ourinhos, Brazilo.
818. Flores, S-ro Alberto, Volta Redondo, Brazilo.
819. Trebbi, S-ino Yolanda, Porto Alegre, Brazilo.
820. Oliveira Sales, D-ro Cetulio de, Canguaretama, Brazilo.
821. Dias da Silva, S-ro I., Rio de Janeiro, Brazilo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956 :

1. Corral, S-ro A. M., Buenos Aires, Argentino.
2. Worcester, S-ino D. M., London, Anglujo.
3. Jaehn, S-ro W., Düsseldorf, Germanujo.
4. Ignjatović, S-ino V., Novi Sad, Jugoslavio.
5. Trudić, Prof. B., Beograd, Jugoslavio.
6. Nolan, S-ro S. I., Wanganui, Novzelando.
7. Futran, S-ro J., New York, Usono.
8. Lamberts, S-ro Victor, Bruxelles, Belgujo.
9. Bluett, S-ro R. L. C., Truro, Britujo.
10. Boulton, F-ino Marjorie, Stoke-on-Trent, Britujo.
11. Hilder, S-ro E. C., Bideford, Britujo.
12. Ingham, S-ro H., Liverpool, Britujo.
13. Jordon, S-ro Henry, Brighton, Britujo.
14. Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland, Britujo.
15. Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland, Britujo.
16. Miller, S-ro J. R., Stone, Britujo.
17. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Britujo.
18. Pearson, S-ro Maurice, Sheffield, Britujo.
19. Jensen, S-ro Gorm Eskjaer, Faxe, Danlando.
20. Aardestrup, S-ro Thorkild, Kopenhago, Danlando.
21. Lange, S-ro Otto C., Kopenhago, Danlando.
22. Skole, S-ro Stig B., Hjørring, Danlando.
23. Waarst, S-ro Emil, Aalborg, Danlando.
24. Aprosio, S-ro E., Torino, Italujo.
25. Boscarino, S-ro A. G. S., Ragusa, Italujo.
26. Girolodi, F-ino Adelaide, Torino, Italujo.
27. Lago, D-ro Mario, Modena, Italujo.
28. Truffo, S-ino Dragoni, Torino, Italujo.
29. Vaona, D-ro Attilio, Torino, Italujo.
30. Lapenna, S-ino Emilija, Zagreb, Jugoslavio.

DONACOJ. Publikigotaj en la januara numero.

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*

La oficiala aperdato de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

KAJ ŜI NASKOS filon ; kaj vi nomos lin JESUO ; ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj. *St. Mateo 1. 21.*

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj, per pk. let. kaj interŝanĝado de revuoj. Certe respondos. S-ro Juan Bta. Feliu Bover. Tapineria 10, Barcelono (Hispanujo).

Deziras interŝanĝi P.K.I. kaj L. kun ĉiuj landoj F-ino Iná Beleza, Rua Doros do Indaiá, 15, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

21-jara universitata studento en lingva fakultato deziras korespondi per bildkartoj tutmonde Esperante, angle, france, germane, hispane, portugale, jugoslave. Giovanni Battiato, Casella Postale 11, Catania, Italujo.

Dr. Wm. A. von Nimitz, M.D., 4009 So Presa Str. 2-nd Floor, San Antonio 10, Texas, U.S.A., deziras korespondi kun ĉiuj landoj ; certe respondos.

Korespondemaj viroj (almenaŭ) 40-jaraj en Okcidenta Eŭropo bonvolu skribi al Esp.-lernantino, S-ino M. Green, Study Dept., Nkana Mine, KITWE, Norda Rodezio.

Gekorespondemuloj ĉiulandaj, sendu viajn adresojn, profesiojn al : S-ino Le Goff, Les Andelys, Eure, Francujo.

Deziregas gekorespondantojn 60 knaboj. Skribu al : S-ro F. B. Hotchkin, Elliston County Sec. School, Cleethorpes, Lincs., Britujo.

GRAVA ATENTIGO. Ni petas ĉiujn membrojn pagi siajn kotizojn por 1956 al la ĉefdelegitoj, perantoj aŭ landaj asocioj kiel kutime. La Administra Oficejo ekfunkciis la 15-an de Novembro en Rotterdam, EENDRACHTSWEG 7. Post dektaga interrompo de la laboroj pro la translokiĝo, la tuta administrado estas nun normale plenumata. Membroj, kiuj ĝis nun forĝesis pagi por 1955 bonvolu fari tion tuj, por povi ricevi ankoraŭ la tutan jarkolekton de la revuo "Esperanto", enhavantan gravajn raportojn, artikolojn kaj valorajn literaturaĵojn.

MARIANNE H. VERMAAS,
Administranto

Pluraj gekursanoj deziras korespondadi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Inter ili estas geinstruistoj, gelernantoj, gestudentoj kaj div. prof., kiuj dezirus interŝ. P.K. kaj koresp. Anonco valida ĝis fino jan. 1956. Bonvolu skribi al : "Esperanto-Kurso", Nova Crnja Banat., Jugoslavio.

Pluraj gekursanoj deziras interŝ. P.K. kaj koresp. kun gesamideanoj en la tuta mondo. Anonco valida ĝis fino jan. 1956. Bonvolu skribi al ĉefkursgvidanto s-no Lehotkay K. Ferenc, Zrenjanin Banat Jugoslavio.

20 gefinkursanoj deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj nacioj. Ĉiuj skribintoj ricevos broŝuron, hispane kaj esperante, historian pri nia urbo. Esperanto Fakto de LINGUA CLUB, strato san Juan Bta. de la Salle 28, *Manresa* (Barcelono), Hispanujo.

Pri popollegendoj deziras korespondi vigle, ĉefe kun nord-eŭropanoj, Gabriel Mora, C/V de Santpedor 1, MANRESA (Barcelona), Hispanujo.

NIKUNE-LERNEJO, la unua por Esperantistidoj, post jam dujara ekzistado, ankoraŭ ne havas eĉ unu lernanton el eksterlando. NIKUNE promesas konstantan edukadon per Esperanto por starigo eventuala de daŭra komunumeto, ĝermo de vera Esperanto-popolo. Kiom da simpatiaj donacos per neŭtrala kasejo kun celo unujaran ebligi restadon de nur du knaboj ? Kosto estos entute £433 ; mia edzino kaj mi jam elspezis £1,500 ! Skribu kun respondkupono al la Lernejestro, Langley Grange, Ifield, CRAWLEY, Sussex, Britujo. Aliaj gazetoj, bonvole kopiu.

Letervespero kaj ekspozicio dum Marto. Sendu pk, gazetojn, afiŝojn ktp. Nepra respondo. ROSARIA ESPERANTO ASOCIO, La Paz 1032, Dpto 3.R.44, ROSARIO, Argentino.

En Aprilo okazos en Nantes granda ekspozicio de floroj kaj plantoj sub la nomo Internaciaj Florfestoj. Interesiĝantoj skribu al la organiza komitato pere de S-ro Marais, 17 Avenue de l'Epine, NANTES, Francujo.

TURISTAJ AGENTEJOJ ! Bonvolu sendi Esperantajn broŝurojn de via hejmlando al : S-ro R. G. Linstead, 125 Beaconsfield Road, Norwich, Norfolk, Britujo.

Turista servo por Benelukso. Petu turistan kilometran karton, prospektojn, informojn al *Robert Loeckx*, FD. UEA, Ministeria Gvidisto Turista, Konijnenperken 109, *Bosvoorde-Brussel* (Belgujo), kontraŭ sendo de pm. aŭ RK. Tel : 723222.

Ekspozicio okazos 15-an de Januaro 1956. Sendu turistajn broŝurojn, afiŝojn, gazetojn ktp. Rekompence ĉiu sendinto ricevos Nov-Zelandan poŝtkarton. Adreso : 1956 Esperanto Ekspozicio, P.O. Box 3013, AUCKLAND, Nov-Zelando.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 11ŝ. 6p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, "Flat Four", 1 Warrington Crescent, London, W.9, Britujo. Tel : CUNningham 4487.

Sveda popollernejo deziras interŝanĝi desegnaĵojn (de 10-11 jaraj geknaboj) kun japana popollernejo. Respondu al Albert Björnemo, instruisto, Box 603, KOLSVA, Svedujo.

S-ro Simpkins sendas korajn salutojn al siaj amikoj en Sud-Afriko, Hong-Kong, Japanujo, Borneo, Aŭstralio, Madejro kaj Eŭropo. Post nelonge li esperas reviziti ilin. C/o Midland Bank Ltd, Bracknell, Berks, Britujo.


Societo Vekiĝo en Kolarovgrad (antaŭe Ŝumen) okazigos la 15-an de decembro solenon kun speciala programo kaj prelegon pri la vivo kaj kreaĵo de L. L. Zamenhof. Bv. sendi multajn salutleterojn kaj adresaretojn por korespondado al : Ĉanko Karaspazov, Sekr. de Societo Esperantista "Vekiĝo", Kolarovgrad, Bulgarujo.

LIBERPENSULOJ ATENTU ! Ĉu vi partoprenos la esperantistan mondkongreson en Kopenhago kaj deziras apartan kunvenon ? Skribu vian opinion al s-ano Bertil ENGLUND, Strömsbro, BOFORS, Svedujo.

La mankompost-klubo de Østfold deziras presaĵojn de la tuta mondo, okaze de ekspozicio. Ni estos tre feliĉaj se vi, de presejoj, havigos al ni leterpaperon kun koverto, reklampresaĵon kaj saluton de via lando. Vi tuj interkontaktu kun la plej proksima presejo. S-ro Oivind Billet, Skansen 1, Fredrikstad, Novegujo.

100% certeco

kontraŭ ĉiuj infekt-malsanoj



kaŭzitaj de aerodisvastigado donas

Aerodesinfektor-vaporigilo por DM 30.

Evola-T oleo por aerodesinfektado DM 34.

senodoro, aŭtomata, por DM 0,03 po horo.

Ekzamenita de la Universitato de Muniko (Germanujo), Ministère de l' instruction publique (Belgujo), Instituto Higiena Kopenhago (Danlando).

Ni serĉas reprezentantojn en ĉiuj landoj.

Chemische Fabrik Bruno Vogelmann
Crailsheim (Germanujo)

